# JARA RAPORTO-2021-2022

## A. Infanĝardeno “La ESPERO”

La lerneja jaro 2021-2022 komenciĝis en Septembro 2021 kaj finiĝis en Junio 2022.

Ni komencis kun 69 infanoj en la tri klasoj :  la unua, dua kaj tria infanĝardeno kaj ni finis la jaron kun 58 infanoj.

La infanoj tre bone lernis la temojn kaj ĉion ĉi montris kelkaj gepatroj, kiuj alvenis al la lernejo por atesti kaj ĉiuj fieras pri tio kaj eĉ vidas en la gepatraj kunvenoj organizitaj de la lerneja estro.

Inter la kaŭzoj de la forlaso de infanoj, estas la manko de materialaj kaj financaj rimedoj, precipe ĉar la plej granda parto de la loĝantaro vivas en malriĉeco.

La gepatroj de la infanoj ĝojas, ĉar ili trovas, ke la alveno de nia infanĝardeno en la kvartalo faciligas al ili kaj diras, ke dum tiuj ĉi ferioj ili multe ĝenas ilin kaj ili devas esti viglaj por bone prizorgi la infanojn, sed kiam ili estas en la lernejo, ili silentas.  Por la venonta lerneja jaro, ni certas, ke ni havos multajn infanojn ĉar "La Espero", nia infanĝardeno estas konata.

La infanoj lernas la francan lingvon, ĉar per la franca oni instruas en la lernejo.



Estro kaj du instruistinoj kun la infanoj


La korto - en la fono necesejoj, dekstre nigra akvujo

## B. Kultivado de legomoj kaj tomatoj

En decembro nia asocio ANEB ricevis monhelpon de SEZ por kultivi legomojn kaj tomatojn.





En januaro la laboro komenciĝis kaj ĉio normaliĝis. La 2 kampoj estis bone monitoritaj kaj ĉiuj fieris pri ĉi tiuj kultivaĵoj. Ni sukcesis rikolti multajn melonojn. Ni vendis kelkajn kaj aliajn donis al la infanoj.

En aprilo, la aferoj ŝanĝiĝis pro la pluvegoj kiuj invadis niajn kampojn kaj tiujn de la tuta regiono. La tomatoj difektiĝis. Ni multon lernis el la inundo.

Por la sekva kultivado ni planas starigi nian novan kultivadon kun nova strategio, uzante la mono kiun ni recevis post la vendo de melonoj.



Tomatoj en akvo

### C. Aliaj atingoj

La centro estas ekipita per televido, per kiu la infanoj uzas por lerni la burundan kulturon, la Esperantofonan kulturon kaj ankaŭ aliajn novaĵojn rilatajn al sia scienca evoluo. Elektra kurento disponeblas en la centro. La gastoĉambro ankaŭ estas ekipita per matraco.

La klasĉambroj estas kovritaj per verda koloro, la simbolo de Esperanto.




Nova: klasĉambroj, por estro kaj instruistinoj




Televidilo kaj bretaro en la salono

Ni ŝatus danki la fondaĵon SEZ, kiu financis la asocion ANEB kaj daŭre etendas por realigi novan komunumajn projektojn.

Ni multon dankas al BAVELO por la subteno kiun ili subtenas al nia landa asocio ANEB

**Rumonge, la 20a Julio 2022** **Aime Patrick Manirakiza**

Aldona informo de BAVELO : **Karaj geamikoj,**

se vi havas demandojn, bonvolu skribi al mi : Manfred@Westermayer.de

Mi petas vin subteni la tagmanĝon almenaŭ unufoje semajne - ankaŭ por la sekva lernojaro, ekde Septembro. La konto de BAVELO :

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22, BIC: SOLADES1VSS, Noto: „Rumonge“

**Koran dankon**